

Terminologio — principoj

Fabien van Mook (NL)

Enhavo

- Bazo pri terminologio
- Komparo inter Esperantujo kaj la cetera mondo
- Ĝeneralaj agadoj
- Ĝenerala terminiga alpaŝo
- Projektoj
- Konkludoj

Mi

- konstruisto (konstrufiziko)
- membro de TAKE
- Terminologia Komisiono

Faka komunikado

- fakaj scioj
- signoj
 - lingvo
 - ne-lingvaj signoj
 - pragmatiko

Terminologio ebligas fakan komunikadon.

Sen faka komunikado, ne ekzistas transdono de scioj.

Sen transdono de scioj, ne ekzistas socia elvolviĝo kaj trejnado.

La triangulo aŭ piramido

- objekto
- nocio (konscio kaj abstraktigo)
- signo (termino)

- difino

Terminologio

Estas scienco en kiu oni pristudas

- objektojn, nociojn kaj signojn,
kaj iliajn interrilatojn,
- iliajn sistemigajn metodojn.

Kulturaj diferencoj ĉe nocioj

- 'dombesto'
- 'martelo'
- lernejaj sistemoj
- koloroj

Eo	De	Cs	En
iri	gehen	jít	go
veturi	fahren	jet	
rajdi	reiten		

Kulturaj diferencoj ĉe nocioj

Eo	Fr	En	Nl	De	Ru	Pl	Cs
planko	plancher	floor	vloer	Fussboden	pol	podłoga	podlaha
Y	plancher	floor	vloer	Decke	perekrytie	strop	strop
plafono	plafond	ceiling	plafond	Untersicht	potolok	sufit	podhled

propono: Y = tekto = horizontala porta konstrukto de domstrukturo por apartigi etaĝojn, kaj servi kiel bazo por planko

Tempaj diferencoj ĉe nocioj

1a periodo	1 lokomotivo	2 vagono	
2a periodo		2.1 motorvagono	2.2 ...
3a periodo			2.2.1 stirvagono

2.2 = senmotora vagono

2.2.2 = simpla (?) vagono

Terminologio rilatas al

- filozofio pri scienco → faka disdivido, interrilatoj
- fakoj kaj sciencoj → lernolibroj, vortaroj, normoj, klasifikoj
- lingvo kaj aliaj signaj sistemoj → fakta uzo
- komputilado kaj informscienco → datumbazoj, laboraj rimedoj
- lingva planado kaj normigo → terminaroj, vortaroj
- dokumentado kaj informado → bibliotekoj, katalogoj

Leksikologio

- ĝenerala lingvaĵo
- unue vortoj, sekve signifoj
- laŭ-alfabeta ordigo
- rezultas al vortaroj

Terminologio

- faka, scienca lingvaĵo
- unue nocioj, sekve terminoj
- laŭ-nocia ordigo
- rezultas al terminaroj

Esperantujo kaj la cetera mondo

- okcidento kaj oriento
- malmultegaj lingvoj havas riĉan fakan vortaron
- multaj lingvoj malpli riĉas ol Esperanto
- preskaŭ ĉiuj lingvoj malpli riĉas ol la Angla
- ĉiu lingvo kapablas!
- profesieco, rimedoj kaj organizaĵoj
- publika akireblo
- universitataj studoj
- Eugen Wüster kaj Ernest Drezen

Ĝeneralaj agadoj

- informado kaj kunordigado
 - UEA
 - * InfoTerm, ISO/TC37
 - * kunvenoj dum UK
 - * Terminologia E-Centro (TEC, <http://esperanto.net/tec/>)
 - terminologio@yahoogroups.com
 - fakaj asocioj
 - * TAKE (<http://purl.org/net/take-tk/>)
 - individuoj
 - * Rüdiger Eichholz (*Pekoteko*, >1977)
 - * Bernhard Pabst (revuo *Terminoteko*, 1991–1996)

- * STEB/Eventoj (<http://www.eventoj.hu/steb>)
- * Jan Werner (Konstru-Forumo, <http://purl.org/net/kofo/>)
- terminaraj projektoj
- vortaraj projektoj
 - *Reta Vortaro*, Wolfram Diestel kaj aliaj,
<http://purl.org/net/voko/revo/>
 - *Aviada terminaro*, Gilbert R. Ledon, eld. Fonto, 2002
 - *Matematika vortaro kaj oklingva leksikono*, Marc Bavant, eld. Kava-Pech, 2003
- enciklopedia projekto (<http://eo.wikipedia.org/>)

Literaturo kaj fontoj

- trejnado
 - *Terminologia gvidilo*, Heidi Suonuuti, 1998
 - *Terminologia kurso*, Jan Werner, 1986
 - *Baza principaro de TEC*, Wera Blanke
(<http://esperanto.net/tec/principaro.html>)
- normoj
 - ISO 704:2000, *Terminologia laboro — principo kaj metodoj*
 - ISO 860:1996, *Internacia harmoniigo de nocioj kaj terminoj*
 - ISO 1087-1:2000, *Terminologia laboro — terminaro — parto 1*
 - ISO 12620:1999, *Komputilaj aplikoj en terminologio — datumelementaj kategorioj*

- fontoj
 - Internacia Esperanto-Biblioteko en Vieno
 - UEA-katalogo
 - bibliografioj (<http://uea.org/dokumentoj/bibliografioj.html>)
 - * *Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto 1887-2002*, Edward Ockey kaj Geoffrey Sutton
 - * *Terminaroj ekde 1980*, Ĵeromo Vaŝe kaj aliaj
 - fakaj/sciencaj revuoj
 - lernolibroj, artikoloj, konferencoj, ktp
 - * *Terminologiaj konsideroj*, Jan Werner, eld. Kava-Pech, 2004
 - * KAEST, *Konferencoj Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*, Ĉeĥio, je ĉiu dua jaro

Terminaraj projektoj

- *Lexicon sylvestre*, 1995
- *UIC Railway Dictionary*, 1997.
- *Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj*, Jan Werner k.a., 2002
- AEK: astronomia terminaro

Terminaro de betono kaj de betonistaj laboroj

- **kunordiganto:** Jan Werner (cz)
- **komisiono:** Willi Brandenburg (de), Fabien van Mook (nl), Djordje Obradović (sl), Josef Trojan (cz), Claude Longue-Épée (fr), Bronislav Ĉupin.
- **periodo ĝis prova versio:** februaro 2000 — majo 2002
- **metodo:** perpoŝta diskutado laŭ propono de Jan Werner
- **interreta versio:** <http://purl.org/net/take-tk/>
- **kromefikaj artikoloj:**
 - *Elementoj de portaj konstru-elementoj*, Jan Werner, okt. 2000
 - *Terminiga procedo en Esperanto*, Jan Werner, nov. 2000

Ĝenerala terminiga alpaŝo

1. organizado
 - 5–8 fakuloj
 - trejnado
 - kolekto de tekstoj kaj fontoj
 - limigo
2. strukturado
 - identigado de terminoj, nocioj kaj difinoj el fontoj
 - starigo de noci-sistemo

3. difinado de nocioj
 - citado de fontoj
 - evito de eraroj
4. elekto de termino
 - akceptebleco
 - ekvivalenteco
 - tradukoj
5. prezentado de terminaro

Komputilaj rimedoj

- simpla strukturo:

nocio-numero: 100
 supernocio: 99
 difino eo: cemento fabrikita el portlanda silikata klinkero, al kiu estas permesate almiksi nur ingredienton por reguli la solidiĝon (gipsoŝtonon k.s.)
 fonto:
 esprimo eo: portlanda cemento
 esprimo en: Portland cement
 esprimo de: Portlandzement [vi]
 esprimo cs: portlandský cement [vi]
 esprimo nl: portlandcement [ne]
 historio: 2000-02: JW. 2000-08-25: FvM, nl-a traduko.

- moderna rimedo: xml (ISO 12620, ISO 12200)

- kromsignoj: Unikodo
- plej gravas:
 - simpleco
 - sen forma ambiguo
 - sendependeco de komputila programo aŭ mastruma sistemo
 - klara instrukcio
- komerca programo: *Multiterm* de Trados

Astronomia terminaro

- **teamo:** Helio Jaques (br), Johano Rapley (gb/fr), Lars Sözüer (de), Alex Mikishev (il/ru), Alex Carciofi (br), Marco Trevisan (es), Nakamura Daishin (jp), Hanna Cayzac (pl/fr), David Galadí-Enriquez (es), Andrzej Cwalinski (pl), David Koch (us), László Garamvölgyi (hu), Donald J. Harlow (us)
- **komenco:** 2000 (lasta ŝanĝo je 2005/11/02)
- **metodo:** interrete, per xml laŭ VoKo
- **interreto:** <http://esperanto.org/AEK>
<http://komputilo.org/~sencay/AT/>
- **amplekso:** ĉ. 2367 artikoloj (96 lingvoj)

Konkludoj

- terminaro estu ordigita laŭ nokia sistemo
- noci-sistemo varias laŭ kulturo kaj tempo
- uzu internaciajn normojn por terminologia laboro
- uzu jam publikigitajn noci-sistemojn
 - internacia normo
 - finstudaj kaj doktorigaj tezoj
- interkultura studo povas utili por internacia lingvo
- publikigu kaj kopipermese disponigu viajn rezultojn al aliaj terminologoj, kaj en la interreto